Programo *Ni semas*

Celo

La programo celas entiri agantojn kun bonaj projektetoj en la sferon de UEA. Ĝi ofertas kvar premiojn jare, po €100 por la plej inda proponita etskala projekto. La programo sekve havas malcentrismajn trajtojn, kaj invitas kunlaboron ankaŭ de homoj, kiuj kutimas agi ekster la kadroj de la Asocio.

Bazo

La programo estas starigata de la Estraro de UEA, surbaze de akceptita regularo trovebla ĉi-kune. Ĝi estas estrara regularo, sekve ni prezentas ĝin al la Komitato informcele. Aldone trovu malneton de la petilo por kandidatigi sin por ricevi subvencion.

Fonto

La fonto de la ideo estas simila projekto en TEJO: *Fonduso Trampolino*, kiu funkcias ekde marto 2014 kaj prijuĝis proponojn ĉiumonate; tamen iom post iom malmultiĝis la proponoj. Por eviti tiun sorton, kaj por malpliigi la administran laboron, UEA ofertos kvar premiojn jare. Antaŭ ol akcepti la regularon, la Estraro diskutigis la proponon kun TEJO, kun la konsilianoj kaj la komisiono de UEA pri regularoj. La rilataj dokumentoj pri la projekto de TEJO estas troveblaj en ĝia retejo.

Kriterioj

Ni aparte subtenos projektojn el pli malkutimaj landoj, kie tiu sumeto ja kovras pli multan agadon. Emfazendas, ke ajnlandaj kaj ajnaĝaj instancoj aŭ homoj rajtas starigi petojn, do ankaŭ TEJO-anoj.

Buĝetpropono 2016

Proponata sub la rubriko ‘Movada Evoluigo’ estas sumo de € 400; kaze de deziro disdoni pli ol kvar subvenciojn, aŭ okaze de kovrendaj administraj kostoj, alia rimedoj estos trovendaj.

Insisto pri membreco

TEJO ne specife devigas tion kaj la akceptita regularo ne postulas tion ĉe UEA, sed ni ja demandos pri tio kaj ĝi ludu rolon en la decidado.

Konsilia laborgrupo

La rekomenda organo por porijuĝi la petojn estas starigota laborgrupo, kiu konsistos el konsilianoj (inter kiuj ja estas TEJO-anoj). Tiu laborgrupo rajtas peti konsilojn de konvenaj homoj por unuopaj kazoj. Preferindus ke ĝi faru rekomendon pri nur unu projekto, sed ĝi rajtas proponi pli ol unu, kun aŭ sen decid-rekomendo. La laborgrupo plie tenas arĥivon de la projekto kaj ricevas kaj prijuĝas la ricevitajn raportojn pri projekt-plenumo. La estraro faras la finan decidon. Ĉiufoje estos disdonitaj €100. Nesukcesintoj ja povos reveni post tri monatoj, esperante je malpli da konkurenco. Kaze de temposentivaj indaj projektoj, la komisiono rajtas proponi aljuĝon de du subvencioj – sed nur kvar entute tra la jaro.

Anoncado

Oni decidas ene de difinita tempo, sed ne nepre anoncas tuj la rezulton. Ekzemple la decido de la 30a de junio estus anoncebla kadre de UK.

Tempo-skemo por la lanĉo de la programo

Julio 2015: Anonci la programon ĝenerale. En Lillo aŭ tuj poste: nomumo de la laborgrupo.

Oktobro 2015: Lanĉo de la programo kaj invito pretigi kaj proponi projektojn.

Decembro 2015: Decido pri la ricevitaj proponoj ekde la 31a de decembro

Januaro 2016: Elpago de la unua subvencio (se aljuĝita)

Formularo por peti financan subtenon de la programo *Ni semas*

1. Petanto

☐ unuopulo ☐ grupo de unuopuloj ☐ Landa Asocio ☐ Faka Asocio ☐ loka grupo ☐ Esperanto-centro ☐ alia

2. Nomo de la petanto: unuopulo(j) aŭ instanca nomo:

_____

3. Kontaktpersono (kun retadreso)

_____

4. UEA-konto al kiu la sumo estos kreditita kaze de sukceso: ___ ___ ___ ___ - ___

5. Mallonge rakontu pri vi aŭ via grupo (kiu vi estas, kia estas via agado…) 50 ĝis 100 vortoj.

_____

_____

_____

6. Aparteno al UEA *

Ĉu inter unuopuloj, almenaŭ unu estas membro de UEA en ajna kategorio? ☐ Jes ☐ Ne

Ĉe instancoj krom LA kaj FA, ĉu la grupiĝo funkcias iel ene de la kadroj de UEA? ☐ Jes ☐ Ne

** Tio ne estas nepra kondiĉo, sed faktoro konsiderota.*

7. Titolo de via projekto

_____

8. Priskribo de la projekto (celo, celgrupo, utilo ks.): *100 ĝis 300 vortoj*:

_____

_____

_____

9. Klarigo, kiel la projekto kontribuas al la plenumo de la celoj de la Strategia Plano de UEA

_____

_____

_____

10. Helpo alia: Se vi petas de UEA helpon aŭ konsilon preter la financa apogo, bv. detali tion.

_____

_____

11. Buĝeto por la projekto: en eŭroj

Bonvolu doni tre resuman buĝeton por la projekto, kun la petata sumo de UEA ene.

Rondaj sumoj akcepteblas; la buĝeto ne devas esti ekvilibra, ĉar ofte la 'profito' estos nemona.

	Kostoj	Rimedoj
	_____	_____
	_____	_____
	_____	_____
	_____	_€100 de UEA_ *(kreu pliajn liniojn laŭbezone)*
SUME:	_____	_____

12. Tempo-skemo por la projekto kaj (se aplikebla) agantoj por la stadioj

Komencdato: (jjjj/mm/tt: _____ / _____ / _____

Kio	Kiu(j)	Ĝis kiam *
Projekta fermo		_____ / __ / __

(rondaj monatoj sufiĉas, krom por projektfermo; kreu pliajn liniojn laŭbezone)*

13. Deklaroj

Projektoj kun daŭro de malpli ol ses monatoj:

Ni komprenas kaj akceptas la devon raporti koncize al UEA ene de monato de la projektfino ☐ Jes

Projektoj kun daŭro de pli ol ses monatoj:

Ni komprenas kaj akceptas la devon raporti al UEA ĉiun sesan monaton ekde aljuĝo de la monsumo kaj krome ene de monato de la projektfino ☐ Jes

Subskribas nome de la projekto: _____ *(nomo legeble)* _____ *(lando)*

_____ _____ _____*Subskribo*

Loko *Dato (jjjj/mm/tt)*